# Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Marto 2004 | MENSUEL/MONATA | 75-a jaro, n-ro 3 (1185)

**Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem**

ISSN 1163.0442 | 5 €

**http://www.sat-esperanto.org/ *** retadreso: satesper@noos.fr**




## *"EMMA"*

*INA FAKO DE SAT !*

*Invito al la kreo de ina-fako de SAT.*

*vidu paĝon 35.*




*Emma Goldmann (1869-1940) - batalanto por inaj rajtoj*

*Tre sukcesa partopreno de esperantistoj dum la Monda Socia Forumo en Barato, paĝo 38.*

**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI**

## El la redaktejo...



*Karaj, vi tenas en la manoj la martan numeron de Sennaciulo kiu pro tradicio estas parte dediĉita al niaj inoj. Kelkaj el ili opinias ke ne necesas havi apartan tagon por inoj, same kiel ne necesas havi apartan tagon por nigruloj, flavuloj, blankuloj ktp. Tamen, tiu tago donas la eblecon denove kaj plian fojon konstati ke ankoraŭ en la 21-a jarcento niaj inaj kamaradoj ne estas efektive egalaj al siaj viraj kamaradoj pro la maljusta socio. Do ni devas daŭre kune batali por ke tio ŝanĝiĝu. Pri kelkaj inaj problemoj vi povos legi en tiu ĉi numero. Krome, estis lanĉita ideo ke oni kreu IN-fakon de SAT kie niaj inaj membroj povos renkontiĝi kaj priparoli pri la agadoj por la ina emancipiĝo. Sukceson!*

*Via Redaktoro*

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques SCHRAM
Abonnement annuel/jara abono France 55, Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

**SATEB**

Sennacieca Asocio Tutmonda En Britio

## JARKONFERENCO 2004 DE SATEB
## 14-16.05.2004
## ĉe Barlaston vilaĝo

Kreŝimir Barkoviĉ, ĝenerala sekretario de la SAT-PK, estos nia gastpreleganto en 2004. Li gajnis "OSIEK-Premion 2002" pro sia tradukaĵo de "7000 tagoj en Siberio" - la temo de unu el liaj du prelegoj. La alia estos "Tri semajnoj en Japanio - sur la spuroj de Lanti".
Por pli bone povi partopreni la diskuton, bonvolu antaŭe legi la libron. La semajnferio estos varia kaj stimula.
Por pliaj detaloj kaj aliĝilo, kontaktu:
Wedgwood Memorial College
Barlaston
Stoke on Trent
Staffs, ST12 9DG
Tel: 01782-372-105/01782-373-4278 rete: wedgwood.college@staffordshire.gov.uk
Se vi ne bone regas la anglan, kontaktu Anne aŭ Ron (vidu ĉi-sube. Ili estas esperantistoj).

Paralele estos Esperanto-Konversacia grupo por komencantoj - gvidata en la angla. Por pliaj informoj, nur pri tio, kontaktu:
Anne Johnson, 42 Beresford Road, London N5 2HZ, Britio, rete: a.johnson@amserve.net
aŭ Ron Lynn, rete: ronsnafulin@aol.com.
Al unu reprezentanto de ĉiu SAT-LEA-o, SATEB ofertas senpagan restadon nur dum la semajnfino. Pri tio kontaktu Anne aŭ Ron kiel supre.

*ĈU VI JAM ALIĜIS AL LA SAT-KONGRESO EN BRATISLAVA?*
*NE ATENDU LA LASTAN MOMENTON ! FRUA ALIĜO HELPAS AL LA ORGANIZANTOJ*

*PAGU VIAN SAT-KOTIZON 2004 !*
*KOTIZTABELO - EN LA LASTA PAĜO*

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (ĉ = cx, ŝ=sx ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon. La Redakcio

# Alvoko por la IN-fako «EMMA» ĉe SAT

IN-fako òEMMAó estu la komenco de la memorganizado de inoj ṇe SAT. Kial, kelkaj tuj demandos? Kial ni bezonas tion? Kiel Tereza informis min, SAT havas 321 inajn membrojn, tio estas ṇirkal 32 % el la tuta membraro, lal informo de KreƉo en la SAT-oficejo. Do, triono de la membroj ṇe SAT estas inoj. Jam tiu nombro montras, ke IN-fako nepre necesas, ṇu ne? Kion ni volas atingi per tiu IN-fako?

IN-fako estu òla plej bona amikinoó de SAT-aninoj, helpu al ili mem transpreni respondecon interne de SAT, interalie ṇe la verkado de in-temaj artikoloj por la Sennaciulo kaj la Revuo.

IN-fako òEmmaó helpu forigi la tradician rolon de inoj, kiu difinas sin ankoral nun sufiṇe ofte helpe de la viro (VIRINO al SINJORINO) - Tion montras ekzemple la abono de Sennaciulo; nur kvin inoj, nemembroj de SAT, mem abonis la gazeton. La aliaj (membroj) legas Ṛin òṇe la edzoó. Ni volas atingi, ke la inoj ṇe SAT en la granda plimulto ne nur kiel edzinoj aperas, sed kiel memkonsciaj inoj, kiuj mem kontribuas, ke SAT atingu siajn celojn.

Kvankam mi scias, ke ṇe inoj la tempo estas grava problemo.

IN-fako estu informejo por esperantistinoj ene kaj ekstere de SAT.

La nomo de Emma Goldmann estu la sinonimo por nia afero.

La IN-fako rompu tabuojn, Ṛi finu antajuṚojn, kiuj apartenas al la rubujo de la historio, se necesas, ankal en SAT mem.

La IN-fako, devas esti unuavice politika, do fako, en kiu ne temu pri trikado kaj kudrado, pri modogazetoj ktp., al en kiu oni plu pensu, ke inoj faras nenion alian krom naski infanojn, kiel tio legeblas en NPIV. Sed kompreneble infanoj estas nia plej granda plezuro.

La IN-fako òEmmaó protestu lalte kontral belecfrenezo, pornografio, la misuzo de inoj kiel nurajn seksobjektojn, kontral la kripligo de inoj, ja kontral ia ajn diskriminacio de inoj en ṇiuj sferoj de la socio, ankal kontral la subalterna rolo de la ino en la familio. Mi proponas, ke ni inoj en tiu fako speciale festu la Internacian tagon de Ino, eble eṇ iam en renkontiṚoj, kiam ni estos sufiṇe fortaj por tio.

EMMA ne nur informu kaj argumentu, sed se necesas,



*Emma Goldmann en la jaro 1919 kiam ŝi transloĝiĝis al Sovetia Rusio. Ŝia nomo estu la nomo de nia fako, ĉu?*

ankal agu. Tion mi ne povus fari sola. Tial mi petas vin, inoj en SAT, pripensu la aferon, komprenu, ke temas pri vi, pri grava kampo de via nuna vivo, enskribiṚu en nian fakon kaj partoprenu. Faru proponojn, kunagu. Nur tiel eblos sukcesa laboro. Skribu al mi kaj diru vian opinion pri la estonta IN-fako. Havu kuraṚon kaj forton, kiel en la ṇiutaga vivo!

*Amikine salutas vin*
*via Dorothea Kaiser (Donjo)*

Mia retadreso estas: kaiser-altenburg@t-online.de
Mia poƉtadreso:
Dorothea Kaiser, Wenzelstr.12, 04600 Altenburg, Germanio.



***8-a de MARTO !***

